N-o 4. **BULTENO** 1936. 14. V.

**DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.**

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas : ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de Esperanto-Asocio en ĈSR. Aperas sesfoje dum la jaro.*

! En Nederlando estis 7400 organizitaj esperantistoj en fino de 1935, la bulgaroj havas nun propran Esperanto-Domon en Sofia, la aŭtomobilo de Brita Esperanto-Asocio traveturis dum 1935 dekmilojn da kilometroj kaj multaj miloj da lernolibroj estis dum tiuj vojaĝoj venditaj. Ktp. ktp.

Malgraŭ ĉiu krizo ni iras antaŭen. Iom post iom, sed nun jam pli ĝenerale kaj pli rapide, ni penetras kaj okupas novajn poziciojn.

Tiel ni atingos nian venkon. Ĉiam pli vasta estos la movado kaj kompreno kun rekono de la mondo venos nur tiam, se ni estos laborintaj en ĉiuj flankoj sufiĉe. La venko nin ne surprizos, se ni lasos la manojn en poŝoj kaj ĝi ne venos subite iam post bona dormo.

Kio estis atingita kaj kion ni gajnos ankoraŭ, estis farita per komuna laboro kaj oferemo. Milfoje pruvita vero pri signifo de organizo validas ankaŭ ĉi tie.

Ĉeĥoslovaka respubliko neniam restis malantaŭe en afero de progreso. Ĉiunaciaj esperantistoj de nia ŝtato kunigu la fortojn por helpi la antaŭeniron de nia afero tra la respubliko. Ni estas multaj, nenies mano manku! Neniu nun havas rajton stari flanke.

Anoncu vin tuj en niajn vicojn! Ni ne bezonas vortojn. Ni kredas, ke vi ne havas superfluan monon. Per alsendo de kotizo vi pruvos al ni konvinke vian amon al la afero.

*Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka respubliko.*

---

Pro kialoj supre diritaj estas tiu ĉi numero admonilo. Ni sendis ĝin al ĉiuj kutimaj ricevantoj por informo kaj konservo. Tiuj, kiuj pagis, akceptu nian dankon! Sed tiuj, kiuj ŝuldas ankoraŭ, trovas aligite pagilon. Ili nepre uzu ĝin!

Se vi ne pagis vian nunjaran kotizon al ni aŭ al via loka grupo, sendu afable tuj Kč 16·— per almetita pagilo.

Se vi ne estas ankoraŭ, fariĝu ankaŭ aktiva membro de la tutmonda organizo Universala Esperanto-Asocio. Pagilon uzu la saman.

Membro kun Jarlibro pagas . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Kč 25·—
Membro-Abonanto kun Jarlibro kaj monata revuo . . . . . . . . Kč 60·—
Membro-Subtenanto kun Jarlibro, monata revuo kaj valoraj libraj premioj Kč 160·—
Membro de EAĈSR pagas al UEA je 3 Kč malpli, do MJ Kč 22·—, MA Kč 57·—, MS Kč 157·—.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz esperantistů ČSR. v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. – Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. – Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. – Podací úřad Praha 45